

# Espero Katolika

**APERIS**  
**"LAUDATO SI"**  
La Encikliko de  
Francisko  
pri la prizorgo de la  
komuna domo



**Numero 4-6/2015**

**Aprilo-Junio 2015**



JARKOLEKTO 112 - N. 1125-1127 - Aprilo/Junio 2015  
Finpresita la 15.07.15 — Finito di stampare il 15.07.15

**Sur la kovrilo:** *Alegoria fotografio, kiu aludas la ekologian temaron pritraktitan de Papo Francisko en sia nova Encikliko Laudato si' (v. p. 27).*

|  |    |
|--|----|
| <b>ENHAVO</b>  |    |
| <b>PASKO 2015</b>  |    |
| Mesaĝo de Papo Francisko "Urbi et orbi"  | 23 |
| <b>MAGNIFICAT</b>  | 24 |
| <b>LA NEUZENDA VORTO</b>   |    |
| Francisko rememoras la armenan "martiriĝon" kaj Turkio protestas                   | 25 |
| Historia noto pri la sufero de la armenoj  | 26 |
| <b>DIFINO</b>  | 26 |
| <b>LAUDATO SI' — LAŬDATA ESTU</b>  |    |
| La nova Encikliko de Papo Francisko  | 27 |
| Kantiko de la kreitaĵoj  | 29 |
| Ne latinlingva titolo, sed ne unuaĵo   | 30 |
| <b>LA PAPO EN SARAJEVO</b>   |    |
| Pilgrimanto de paco kaj dialogo  | 31 |
| Resumo de la eventoj   | 32 |
| <b>SURVOJE AL LA 21-a EEK</b>  |    |
| Historio kaj prezento de Strasburgo, kiu gastigos la ĉi-jaran Ekumenan E-Kongreson | 33 |
| Naskiĝo de lingvoj   | 35 |
| La Marsejla el Strasburgo  | 36 |
| La EEK-kongresejo kaj kunsido de IKUE; ĝia budo dum la UK                          | 37 |
| <b>UNUAĴO DE PAPO EN VALDANA TEMPLEO</b>   | 37 |
| <b>LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN WROCLAW (PL)</b>                                       | 38 |
| <b>FUNE BRE</b>  | 39 |
| <b>MOVAD E</b>   | 40 |

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italia**

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> \* Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>

UEA-konto "ikue-v" \* Banko: "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italia

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRXXXX

**Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma**

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

**Presejo - Tipografia**

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

**Respondca Direktoro - Direttore responsabile**

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italia  
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

**INTERNACIA KATOLIKA UNIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminielli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# “NI HAVU LA KURAĜON DE LA PARDONO KAJ DE LA PACO”

*Paska Mesaĝo de la Papo 2015, Placo Sankta Petro, 5.4.2015*

## Kristo resurektis!

La amo venkis la malamon, la vivo venkis la morton, la lumo forpelis la mallumon!

Jesuo Kristo, pro amo al ni, forigis de si sian dian gloron; Li sin malplenigis, alprenis la formon de sklavo, kaj sin humiligis ĝis morto, kaj la morto per kruco. Pro tio Dio Lin altigis kaj faris Lin Sinjoro de la universo. Jesuo estas Sinjoro!



Per sia morto kaj resurekto Jesuo indikas al ĉiuj *la vojon* de la vivo kaj de la feliĉo: ĉi tiu vojo estas *la humilo*, kiu kuntrenas *la humiliĝon*. Ĉi tiu estas la vojo, kiu kondukas al la gloro. *Nur tiu, kiu humiligas sin povas iri al “tio, kio estas supre”, al Dio (kp Kol 3,1-4).* Fierulo rigardas “de supre malsupren”, humilulo rigardas “de malsupre supren”.

Je la mateno de Pasko, sciigite de la virinoj, Petro kaj Johano kuris al la tombo kaj trovis ĝin malfermita kaj malplena. Tiam ili alproksimiĝis kaj “*kliniĝis*” por eniri en la tombon. Por eniri en la misteron oni devas “*kliniĝi*”, malaltiĝi. Nur tiu, kiu malaltiĝas komprenas la gloradon de Jesuo kaj povas sekvi Lin sur Lia vojo.

La mondo proponas atingi sukceson ĉiurimede, konkurenci, respektigi sin... Sed la kristanoj, pro la graco de Kristo mortinta kaj resurektinta, estas *la burĝonoj de alia homaro*, en kiu ni klopodas vivi je la servo unuj de la aliaj, esti ne arogantaj sed dispo-

naj kaj respektemaj.

Ĉi tio *ne estas malforteco, sed vera forto!* Kiu portas en si mem la forton de Dio, Lian amon kaj Lian justecon, ne bezonas utiligi perforton, sed parolas kaj agas per la forto de la vero, de la belo kaj de la amo.

De la Sinjoro resurektinta ni petegas la gracon ne cedi al la orgojlo, kiu nutras la perforton kaj la militojn, sed havi la humilan kuraĝon de la pardono kaj de la paco. De Jesuo venkinta ni petas la mildigon de la suferoj de tiom multe da niaj gefratoj persekutataj pro Lia nomo, samkiel de ĉiuj, kiuj maljuste trasuferas la sekvojn de la okazantaj konfliktoj kaj perfortoj. Da ili estas multaj!

Pacon ni petas antaŭ ĉio por Sirio kaj por Irako, por ke ĉesu la bruego de la armiloj kaj restariĝu la bona kunvivado inter la diversaj grupoj, kiuj konsistigas ĉi tiujn amatajn Landojn. La internacia komunumo ne restu senaga fronte al la senlima homeca tragedio interne de ĉi tiuj Landoj kaj al la dramo de la multenombraj rifuĝintoj.



Pacon ni petegas por ĉiuj loĝantoj de Sankta Lando. Povu kreski inter Israelanoj kaj Palestinanoj la kulturo de renkontiĝo kaj rekomenciĝi la procezon de paco, tiel ke estu metata fino al jaroj da suferoj kaj disiĝoj.

Pacon ni petas por Libio, por ke haltu la absurda okazanta sangelverŝo kaj ĉiu barbara perforto, kaj ĉiuj, kiuj havas al sia koro

la sorton de la lando, faru klopodojn por favori la repaciĝon kaj konstrui fratecan sacion, kiu respektu la homan dignon. Ankaŭ en Jemeno ni petdeziras, ke venku komuna volo de repaciĝo por la bono de la tuta loĝantaro.



Samtempe kun espero ni konfidas al la kompatema Sinjoro la interkonsenton atingitan en ĉi tiuj tagoj en Laŭzano, por ke ĝi estu definitiva paŝo direkte al mondo pli sekura kaj frateca.

De la Sinjoro Resurektinta ni preĝpetas la donacon de la paco por Niĝerio, por Suda Sudano kaj por diversaj regionoj de Sudano kaj de Demokrata Respubliko Kongolando. Komuna preĝo leviĝu el ĉiuj bonavolaj homoj por tiuj, kiuj perdis la vivon – mi pensas aparte pri la gejunuloj murditaj pasintan jaŭdon en la Universitato de Garissa, en Kenio, por tiuj, kiuj estis forrabitaj, por tiuj, kiuj devis forlasi sian hejmon kaj siajn amataĵojn.

La Resurekto de la Sinjoro alportu lumon al la amata Ukrainio, precipe al tiuj, kiuj trasuferis la perfortojn de la konflikto de la lastaj monatoj. Povu la lando trovi

pacon kaj esperon danke al la sindevigo de ĉiuj koncernataj partioj.



Pacon kaj liberon ni petas por multaj viroj kaj virinoj submetitaj al novaj kaj malnovaj formoj de sklaveco fare de krimaj personoj kaj organizoj. Paco kaj liberon por la viktimoj de la fikomercistoj de narkotaĵoj, multfoje aliancigitaj kun la povoj, kiuj devus defendi la pacon kaj la harmonion en la homa familio. Kaj pacon ni petas por ĉi tiu mondo submetita al la fikomercistoj de armiloj.

Al la marĝenigitaj, al la malliberuloj, al la malriĉuloj kaj al la migrantoj, kiuj tre ofte estas rifuzataj, mistraktataj kaj forĵetataj; al la malsanuloj kaj al la suferantoj; al la infanoj, precipe al tiuj, kiuj trasuferas perforton; al tiuj, kiuj hodiaŭ estas funebrantaj; al ĉiuj bonavolaj viroj kaj virinoj alvenu la konsola voĉo de la Sinjoro Jesuo: «Paco al vi!» (Luk 24,36) «Ne timu, mi estas resurektinta kaj ĉiam estos kun vi!» (kp *Roma Meslibro, Enira Antifono* de la Paska tago).

Tradukis D-ro Antonio DE SALVO

*En la posta tago (postpaska lundo, la 6-an de Aprilo 2015) grupeto de esperantistoj estis en placo Sankta Petro en Vatikano kun la paneloj "Esperanto".*

Mia animo altigas la Eternulon, kaj mia spirito ĝojis en Dio, mia Savanto, ĉar li rigardis la humilecon de Sia sklavino; Ĉar jen de nun ĉiuj generacioj nomos min feliĉa. Ĉar la Potenculo faris al mi grandaĵojn, kaj sankta estas Lia nomo. Kaj Lia boneco estas por ĉiuj generacioj. Al tiuj, kiuj Lin timas. Li montris forton per Sia brako, Li dispelis fierulojn en la penso de ilia koro. Li malaltigis potenculojn de iliaj tronoj, kaj Li altigis humilulojn. Malsatulojn Li pleniĝis per bonaĵo, kaj riĉulojn Li forsendis malplenaj. Li helpis Sian servanton Izrael, memorante Sian korfavoron. Kiel Li parolis al niaj patroj, al Abraham kaj al lia idaro eterne. *Luk 1,46-55*

## LA NEUZENDA VORTO

La 12-an de Aprilo frazo eldirita de Papo Francisko estigis la fortan reagon de la registaro de Turkio. La ambasadorejo de Turkio ĉe la Sankta Seĝo eĉ difinis “neakceptebla” tion, kion la Papo diris en la Baziliko de Sankta Petro okaze de la Meso por la jarcenta datreveno de la armena “martiriĝo”. Ankaro vokis hejmen sian ambasadoron ĉe la Sankta Seĝo “por konsultiĝoj” (kio, en la diplomatia lingvaĵo, signifas fortan incitiĝon) kaj ĝi ankaŭ vokis la apostolan nuncion en Turkio mons-ron Antonio Lucibello, por elmontri al li sian malkontenton.

Sed, kion diris la Papo por kolerigi la turkan registaron?

Francisko, laŭvorte citante la komunan Deklaracion de Johano Paŭlo la 2-a kaj Karekin la 2-a (jaro 2001), parolis pri la masakro de la armenoj, komenciĝinta en 1915, kiel «la unua **genocido** de la 20-a jarcento». Al tiu vorto rilatis la protestoj de Turkio, kies ĉefministro Ahmet Davutoglu akuzis la Papon pri “aliĝo al la fronto de malbono”. Kaj la respublika prezidento Recep Tayyip Erdogan “kondamnis” la vortojn de Francisko, avertante lin ne refari ĉi tiun eraron.

En la postaj tagoj, respondante al demandoj de ĵurnalistoj, la direktoro de la vatikana gazetara salono pastro Federico Lombardi faris jenan deklaron: “La vortoj de Francisko enkadriĝis en preciza kaj kohera linio, laŭ la celo de dialogo. Ĝi estis citaĵo el la komuna deklaro de sankta Johano Paŭlo la 2-a kaj Karekin la 2-a, kaj la Papo diris, ke tiu evento estis la unua de la 20a jarcento, al kiu sekvis dua, tria kaj la aliaj similaj eventoj. La parolado de la Papo celis diri: ni konstati ĉion tion tiel, ke ni povu havi la taŭgajn sintenojn por antaŭeniri en pli bonan historion, en kiu tiaj aferoj ne ripetigu”.

### La tago de soleno

“Nur Dio povas plenigi la malplenojn, kiujn la malbono malfermas en niaj koroj kaj en nia historio”, tion diris la Papo celebrante la Meson por la jarcenta datreveno de la ar-

mena “martiriĝo”. Dum la celebros li ankaŭ proklamis “doktoro de la Eklezio” sanktan Gregoron de Narek, monaĥon kaj poeton de la 10-a jc. Kuncelebris la katolika Patriarko Nerses Bedros la 19-a (estis lia lasta ago en Vatikano, ĉar li mortis la 25-an de Junio, pro koratako) je la ĉeesto de la du Katolikosoj Karekin la 2-a kaj Aram la 1-a kaj de la armena prezidento Serz Azati Sargsyan. Al ili Francisko liveris mesaĝon rememore pro la terura masakro de la armena popolo.



*Memoriga monumento de armena genocido 1915*

Ni travivas “tempon de milito” – substreki Francisko dum sia saluto al la armenaj fideluloj antaŭ la Meso – “trian mondmiliton ‘popece’, dum kiu ni ĉiutage spektas malhumanajn krimojn, sangoplenajn masakrojn kaj la frenezecon de la detruado”. “Ankaŭ hodiaŭ ni travivas specon de genocido, kaŭzitan de ĝenerala kaj kolektiva indifereco, de la komplika silento de Kaino, kiu ekkrias: ‘Ĉu gravas por mi? Ĉu mi estas la gardanto de nia frato?’”.

Francisko poste memorigis la “tri grandajn, senprecedencajn tragediojn” travivitajn de la homaro dum la pasinta jarcento, ekde tiu ĝenerale taksata “la unua genocido de la 20-a jarcento”, kiu “trafis la armenan popolon”, la unuan kristanan nacion, kune kun sirokatolikoj kaj ortodoksuloj, asiroj, ĥaldeoj kaj grekoj, dum kiu oni “mortigis episkopojn, pastrojn, gereligiulojn, virinojn,

virojn, maljunulojn kaj eĉ sendefendajn infanojn kaj malsanulojn”. Kaj la aliajn du fiplenumitajn de naziismo kaj stalinismo. Kaj pli ĵusdate la amasmortigojn en Kamboĝo, Ruando, Burundio, Bosnio.

“Ŝajnas, ke la homaro ne sukcesas ĉesi elverŝi senkulpan sangon” (...) “Ŝajnas, ke la homa familio rifuzas lerni el siaj eraroj kaŭzitaĵoj de la leĝo de teroro” (...). “Ŝajnas, ke ni ankoraŭ ne lernis, ke milito estas frenezaĵo, senutila masakro”.

Pro tio, en la jarcenta datreveno de la armena “martiriĝo”, Francisko “kun la koro

trapikita de doloro” resubstreki la neceson memorigi tiun “tragikan eventon”, tiun “senmezuran kaj frenezan ekstermadon”: “memorigi estas necese, eĉ devo, ĉar kiam ne plu ekzistas memoro, signifas, ke la malbono tenas malfermita la vundon; kaŝi aŭ nei la malbonon estas kiel lasi, ke vundo daŭre ellasu sangon, sen kuraci ĝin!”. Certaj, ke “la malbono neniam fontas el Dio”, “radikiĝintaj en la kredo”, “ni kredkonfesas, ke kruelecon oni neniam povas atribui al la agado de Dio, kaj des pli malpli ĝi ne povas ricevi el lia Sankta Nomo ian ajn pravigon”.

La armena martirigo, kelkfoje ankaŭ konata kiel armena granda hororo aŭ armena masakro, estis la perforta deportado kaj fina murdado de nedeterminita nombro da armenoj dum la regado de la Junaj Turkoj en la Otomana Imperio de 1915 ĝis 1917 dum la Unua Mondmilito. Ĝi karakteriziĝis pro la brutaleco de la masakroj kaj la uzado de perfortaj marŝadoj je ekstremaj kondiĉoj, kiuj celis malfortigi kaj konsekvence mortigi la armenojn. La tradicia dato de ĝia komenco estas memorata la 24-an de Aprilo 1915, la sama tago, kiam la otomanaj aŭtoritatoj arestis ĉ. 250 armenajn intelektulojn, gvidantojn de la armena komunumo de Istanbulo. Poste la otomanaj militistoj forpelis la armenojn el iliaj hejmoj kaj devigis ilin marŝi centojn da kilometroj, laŭlonge de la dezerto de tio, kio hodiaŭ estas Sirio, senigataj de nutraĵoj kaj akvo. La masakroj ne respektis la aĝon aŭ sekson de la viktimoj, kaj la perfortoj kaj aliaj seksaj aferoj estis oftaj. Kvankam Respubliko Turkio, heredanto de la Otomana Imperio, ne neas, ke la civilaj masakroj kontraŭ la armenoj vere ekzistis, ĝi ne agnoskas, ke ĝi estis genocido; ĝi oficiale konsideras, ke tiuj masakroj ne estis la rezulto de amas-ekstermiga plano fare de la Otomana Imperio, sed ke ili okazis pro la interetnaj bataloj, la malsanoj kaj la malsatego dum la konfuza periodo de la Unua Mondmilito. Malgraŭ tiu tezo, preskaŭ ĉiuj esploristoj, inkluzive de kelkaj turkoj, opinias, ke la okazintaĵoj kongruas kun la difinado per la vorto genocido. Restas necertaj la statistikoj pri kiom da personoj pereis; oficialaj turkaj instancoj kredas, ke la nombro da viktimoj eble kalkuliĝas inter 200.000 kaj 600.000; aliaj fontoj kalkulas pli ol unu miliono kaj duono.

## DIFINO

La enhavo de la nocioj “figure dirite” kaj “simbole opiniite” malrapide al ni malproksimiĝas. Tehnokratia pensado nin jam ekde la unua lernoklaso instruas difini kion ajn, kaj se ni ne havas por la valorado trafan kaj kompreneblan difinon, ni falas en du suspektojn. Aŭ ni vivas kaj agas diference, ol tion proklamas niaj vortoj, aŭ male, ni vivas kaj agas laŭlitere.

En la unua kazo ni havas aspekton kiel honestuloj, en la dua kazo kiel fundamentalistoj.

### *Alivorte...*

*Se ni vivas perpiede sur la tero, ne signifas tio, ke ni vivas tersurface.*

*Se ni respektas dogmojn, ne signifas tio, ke ni rezonas dogmece.*

*Se ni revas, ne signifas tio, ke ni ankoraŭ ne vekigis.*

*Max Kaŝparŭ*

## LAŬDATA ESTU

### Pri la prizorgo de la komuna domo

La integra ekologio fariĝu nova paradigmo de justeco, ĉar la naturo ne estas simpla kadraĵo de la homa vivo: jen la kerno de la dua encikliko de papo Francisko *“Laudato si”* (Laŭdata estu) pri la prizorgo de la komuna domo. La dokumento ĉerpas sian titolon el la preĝalvoko de sankta Francisko el Asizo entenata en la kantiko de la kreitaĵoj. La sesĉapitra encikliko kolektas, laŭ koleגיעca vidpunkto, ankaŭ plurajn meditojn de la episkoparaj konferencoj de la mondo kaj finiĝas per du preĝoj, unu interreligia kaj unu kristana, por la savogardo de la kreaĵaro.



Preskaŭ 200 paĝoj de teksto, inkluzive de notoj, enkonduko, ses ĉapitroj, du finaj preĝoj: ili estas la ciferoj de ĉi tiu encikliko, dokumento, kiun antaŭ ĝia oficiala apero kelkaj iom aŭdacaj komentistoj difinis *“ekologiista manifesto”*.

Ĝi, longe atendita, pritraktas la median temaron: al ĝi Francisko jam de la komenco de sia papado dediĉis multajn intervenojn, memorigante plurfoje laŭ la spuroj de siaj antaŭuloj la neceson esti *«gardantoj de la donacoj de Dio»*, inter kiuj estas la kreaĵaro. Kiam li estis ĉefepiskopo de Buenos Aires, Bergoglio havis decidan rolon en la redakto de la fina dokumento de *“Aparecida 2007”*,

de la 5-a konferenco de la latinamerikaj episkoparoj: inter la pluraj temoj en tiu dokumento ofte menciita por ekkompreni la paŝtistajn prioritatojn kaj la penson de la nuna Papo estas tiu pri la naturmedio – temaro, kiun nun la Papo pli vaste pritraktas en sia encikliko. Ni publikigas resumon.

### Nia fratino Tero

*“Laŭdata estu”* kantis sankta Francisko el Asizo. Per tiu bela kantiko li memorigis al ni, ke nia komuna domo estas ankaŭ fratino, kun kiu ni kundividas la ekzistadon. Tiu ĉi fratino protestas pro la malbono, kiun ni kaŭzas al ŝi, pro nia senrespondeca uzo kaj pro nia trouzo de la bonoj, kiujn Dio metis en ŝin. Ni kreskis pensante, ke ni estis ŝiaj mastroj kaj regantoj, rajtigitaĵaj priŝteli ŝin. La detruo de la homa naturmedio estas io tre grava. Patriarko Bartolomeo aparte parolis pri la neceso, ke ĉiu pentu pri sia maniero mistrakti la planedon. Pri ĉi tio li plurfoje esprimis sin laŭ neŝancela kaj instiga maniero, invitante nin rekoni la pekojn kontraŭ la kreaĵaro. Ĉar *“krimo kontraŭ la naturo estas krimo kontraŭ ni mem kaj peko kontraŭ Dio”*. *“Mi opinias”*, skribas la Papo, *“ke sankta Francisko estas la antonomazia ekzemplo de la zorgemo pri tio, kio estas malforta kaj de kompleta ekologio travivita kun ĝojo kaj aŭtentikeco. Li estas la sankta patrono de ĉiuj, kiuj studas kaj laboras en la sektoro de ekologio”*.

### Alvoko

La urĝa defio protekti nian komunan domon inkluzivas la zorgemon unuigi la tutan homan familion en la serĉo de eltenebla kaj tuteca evoluo, ĉar ni scias, ke la aferoj povas ŝanĝiĝi. La Papo listigas kelkajn pivotajn konceptojn tra la tuta encikliko, ekzemple: la strikta rilato inter malriĉuloj

kaj la malforteco de la planedo; la konvinko, ke ĉio en la mondo estas intime kunligita; la invito serĉi aliajn manierojn koncepti ekonomion; la grava respondeco de la internacia politiko; la kulturo de la forĵeto kaj la propono de nova vivostilo. Ekzistas formoj de poluciado, kiuj ĉiutage trafas la personojn. Al tio aldoniĝas la poluciado estigita de la rubaĵoj. La tero, nia domo, skribas la Papo, ŝajne pli kaj pli transformiĝas en senmezuran deponejon de rubaĵoj.



### **Pura akvo por ĉiuj**

La klimato estas komuna bono de ĉiuj kaj por ĉiuj. La trinkebla kaj pura akvo estas problemo el unuaranga graveco, ĉar ĝi estas nemalhavebla por la homa vivo kaj por subteni la terajn kaj marajn ekologiajn sistemojn. Por la homoj la aliro al trinkebla kaj sekura akvo estas esenca homa rajto. Ĉi tiu mondo havas gravan socialan ŝuldon rilate al la malriĉuloj, kiuj ne povas aliri trinkeblan akvon. Francisko mencias interalie la “pulmojn” de la planedo, plenajn je biodiverseco: Amazonio, la rivera baseno de Kongo aŭ la grandaj akvoriĉaj stratomoj kaj la glaciejoj. Vere estas aŭtentika “ekologia ŝuldo”, ĉefe inter nordo kaj sudo, kunligita kun komercaj misedilibroj, kiuj influas sur la ekologia sistemo. La problemo estas la manko de la nepra kulturo por alfronti ĉi tiun krizon kaj necesas gvidantoj kiuj indiku la vojon. Rimarkindas, ĉi-koncerne, la malforta reago de la internacia politiko. La submetiĝo de politiko je teknologio kaj financo montriĝas dum la malsukcesoj de la mondaj pintaj kun-

venoj pri la naturmedio. Intertempe ekonomiaj povoj daŭre pravigas la nunan mondan sistemon, en kiu unuarangas spekulado kaj serĉo de financaj rentumoj.

### **Gardi la Teron**

“Ni ne estas Dio. La tero antaŭas nin kaj estis donita al ni. Gravas legi la bibliajn tekstojn en ilia kunteksto kaj memori, ke ili invitas nin kultivi kaj gardi la ĝardenon de la mondo. “Kultivi” signifas plugi aŭ prilabori grundon; “gardi” signifas protekti, prizorgi, konservi, vigli. La sciencoj aplikitaj al la teknologio, bone orientitaj, kapablas ne nur produkti vere valorajn aĵojn por plibonigi la vivokvaliton de la homa estulo, ekde la objektoj uzataj hejme ĝis la grandaj transportiloj. Tamen ni ne povas ignori, ke la atoma energio, la bioteknologio, informadiko, la kono de nia DNA mem kaj la aliaj potencioj, kiujn ni atingis, proponas teruran povon.

### **Ĉiutaga ekologio**

La Papo poste parolas pri ekologio en la ĉiutageco. Necesas, li memorigas, prizorgi la publikajn spacojn. La manko de loĝejoj estas grava en multaj mondopartoj. La vivokvalito en la urboj estas sufiĉe kunligita kun la transportiloj, kiuj estigas ofte grandajn penojn ĉe la loĝantoj. En la urboj veturas multaj aŭtomobiloj uzataj de unu aŭ du personoj, pro tio la trafiko fariĝas intensa, kreskas polucio, oni konsumas senmezurajn kvantojn da nerenovigebla energio kaj fariĝas necesa la konstruo de pliaj stratoj kaj parkejoj, kiuj damaĝas la urban tutajon. Multaj fakuloj samopinias pri la neceso doni prioritaton al publikaj transportiloj. La katastrofajn prognozojn oni ne plu povas konsideri kun malŝato kaj ironio.

### **Agadlinioj**

La teksto de la encikliko daŭras per pri-trakto de agadlinioj. Por la malriĉaj landoj, oni legas, prioritataj devas esti la elradikigo de mizero kaj la sociala evoluo de iliaj loĝantoj; samtempe, ili devas atenti la skandalan egan konsumadon fare de kelkaj privi-



legiaj sektoroj de sia loĝantaro kaj pli bone batali kontraŭ koruptado. En ĉiu diskuto pri entreprenista iniciato oni devus levi serion da demandoj por povi distingi, ĉu ĝi kondukos al vera integra evoluo: Kiucele? Kial? Kie? Kiam? Kiamaniere? Al kiu ĝi estas alcelita? Kiuj riskoj estas? Je kiu prezo? Kiu pagas la elspezon kaj kiel li povos fari tion? La principo de la maksimumigo de profitoj estas koncepta distordo de ekonomio. Kaj kiu estas la rolo de politiko? Ni bezonas politikon, kiu rezonu laŭ vasta vido, kiu akcelu novan tutecan aliron al temoj kaj problemoj, inkluzivante en interfaka dialogo la diversajn aspektojn de la krizo.

### Ŝanĝi vivostilon

Alia agadlinio estas la ŝanĝo de vivostiloj: ĝi povus ekzerci sanan premon sur tiuj, kiuj havas la politikan, ekonomian kaj so-

cian povon. Tio okazas kiam la movadoj de konsumantoj sukcesas ĉesigi la aĉetadon de specifaj produktoj. La eduko al naturmedia respondeco povas kuraĝigi diversajn sintenojn, kiuj rekte kaj grave influas sur la prizorgo de la naturmedio, kiel la neuzadon de plastikaĵoj aŭ de papero, la malkreskon de akvo-konsumado, la diferencigon de la rubaĵoj, la kuiradon nur de tio, kion oni efektive konsumas, la zorgemon rilate al aliaj vivantuloj, uzi publikan transportadon aŭ kune uzi la saman veturilon, planti arbojn, malŝalti senutilajn lumojn. Oni ne devas pensi, ke ĉi tiuj klopodoj ne sukcesos ŝanĝi la mondon. La ekologia krizo estas alvoko al profunda interna konvertiĝo. Sobreco, praktikata kun libereco kaj ekkonscio, estas liberiga: ĝi ne estas “malpli da vivo” nek “vivo kun malalta intenseco”, sed tute la malo. Oni povas bezoni malmulton kaj vivi multe.

## KANTIKO DE LA KREITAĴOJ



Plejalta, Ĉiopova, Bona Sinjoro, Viaj estas la laŭdoj, la gloro kaj la honoro kaj ĉiuj benoj; nur al Vi, Plejalta, ili konvenas kaj neniu homo estas inda Vin nomi.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, kun ĉiuj Viaj kreitaĵoj, precipe sinjoro frato Suno, kiu portas tagon kaj Vi lumigas per ĝi; kaj ĝi estas bela kaj brilege elradianta kaj de Vi, Plejalta, ĝi estas simbolo.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro fratino Luno kaj steloj, kiujn Vi formis en ĉielo helaj, multvaloraj kaj belaj.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro frato Vento kaj pro aero nuba, serena kaj ĉia vetero, per kiu Vi donas vivtenon al Viaj kreitaĵoj.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro fratino Akvo, kiu estas tre utila, multvalora, ĉasta kaj humila.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro frato Fajro, per kiu Vi lumigas la nokton, kaj ĝi estas bela, gaja, forta kaj fortika.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro nia patrino, fratino Tero, kiu vivtenas nin kaj regas kaj produktas diversajn fruktojn kaj kolorajn florojn kaj herbon.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, de tiuj, kiuj pardonas pro Via amo, kaj suferas malsanojn kaj dolorojn; beataj tiuj, kiuj suferas ilin trankvile, ĉar ili estos kronataj de Vi.

Laŭdata estu, mia Sinjoro, pro nia fratino Morto de l' korpo, kiun neniu vivanta homo povas eviti. Ve al tiuj, kiuj mortos en mortaj pekoj! Beataj tiuj, kiuj troviĝas en Viaj tre sanktaj Voloj, ĉar la dua morto ne trafos ilin.

Laŭdu kaj benu mian Sinjoron, kaj danku, kaj honoru Lin kun granda humileco.

*Sankta Francisko el Asizo*

## NE LATINLINGVA TITOLO, SED NE UNUAĴO

Ne surprizas, ke la unua Papo kun la nomo de la sanktulo de Asizo citas version de la fama “Kantiko de la kreitaĵoj” en sia dua encikliko. Male, povas pli surprizi la fakto, ke tiun version oni citas en la komencaj vortoj, kiuj do, laŭ tradicio, fariĝas la oficiala titolo de la dokumento: enciklika titolo ne en la latina lingvo, sed en la praitala lingvo.



En la pasinteco la enciklikojn ordinare oni verkis rekte en la latina. Pli ĵusdate oni verkis ilin en la itala, aŭ en la pola kaj germana kun Johano Paŭlo la 2-a kaj Benedikto la 16-a, kaj poste oni tradukis ilin en la latinan, kun latinlingva titolo.

Tra la historio, post la unua dokumento, kiu ricevis la nomon “encikliko” (“*Ubi Primum – Tuj kiam*” de Benedikto la 14-a jaro 1740), aperis kelkaj enciklikoj verkitaĵ kaj sekve titolitaj en aliaj lingvoj. Ĝi estis la kazo de kelkaj enciklikoj pri la “surtera povo” de la Papo kaj publikigitaj en apartaj vivomomentoj de la Papa Ŝtato, ekzemple: “*Il trionfo – La triumfo*” de Pio la 8-a en 1814, “*Quel Dio – Tiu Dio*” kaj “*Le armi valorose – La bravaj armiloj*” de Gregoro la 16-a en 1831. Alian lingvon ol la latinan foje oni uzis por enciklikaj leteroj adresitaj al specifaj episkoparoj kaj publikigitaj en la

lingvo de la alcelatoj.

Tial, dum Pio la 9-a verkis ĉiujn siajn 41 enciklikojn en la latina, lia posteulo Leono la 13-a el 86 verkis 5 en la itala kaj 2 en la franca; Pio la 10-a el 16 enciklikoj verkis 2 en la itala kaj unu el la franca. La nelatinlingvaj estis adresitaj al la respektivaj lingvaj grupoj.

Ankoraŭ: dum Benedikto la 15-a verkis ĉiujn siajn 12 enciklikojn en la latina, lia posteulo Pio la 11-a verkis unu en la itala (“*Non abbiamo bisogno – Ni ne bezonas*”) de 1931, kontraŭ la malfondo fare de la faŝisma reĝimo de la itala katolika Agado. Ĝi estis la lasta encikliko antaŭ tiu de Francisko adresita al ĉiuj episkopoj kaj verkita en nacia lingvo. La alia nelatinlingva encikliko de Pio la 11-a estis tiu en la germana (la fama “*Mit brennender Sorge – Kun brulanta zorgo*” kontraŭ naziismo, 1937).



Ĉiuj 8 enciklikoj de Johano la 23-a, la 7 de Paŭlo la 6-a, la 14 de Johano Paŭlo la 2-a kaj la 3 de Benedikto la 16-a havis latinlingvan titolon.

Nun estas “*Laudato si*”. Titolo – ne en la latina, eĉ ne en nunepoka nacia lingvo, sed en la praitala – de encikliko aldirektita al la tuta mondo, katolika kaj ne katolika.

*Jesuo diris al ili: Mi estas la pano de vivo; kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos. Joh 6,35*

## PILGRIMANTO DE PACO KAJ DIALOGO

“Mi iris al Sarajevo por kuraĝigi la iradon de paca kunvivado inter diversaj loĝantaroj”: la tagon post sia vojaĝo al Bosnio-Hercegovino Papo Francisko memorigis, al la fideluloj ariĝintaj en placo Sankta Petro por la dimanĉa Anĝeluso, la signifon de sia lasta apostola vojaĝo.



Temis pri intensa tago la 6-an de Junio travivita en tiu urbo, kiu dum jarcentoj estis loko de kunvivado de popoloj kaj religioj, tiom, ke oni difinis ĝin la “Jerusalemo de Okcidento”. En la ĵusa pasinteco, memorigis la Papo, ĝi estis “simbolo male de la militaj detruoj”. “Nun”, memorigis Francisko antaŭ la Anĝeluso post la vojaĝo, “okazas bela

proceso de repaciĝo, kaj ĉefe pro tio mi iris: por kuraĝigi tiun iradon de paca kunvivado inter diversaj loĝantaroj; peniga irado, malfacila, sed ebla! Kaj ili ĝin faras bone!”



Francisko dankis ankoraŭfoje ĉiujn pro la ricevita akcepto, la katolikan komunumon kaj ĉiujn fidelulojn – ortodoksulojn, islamanojn, hebreojn kaj tiujn de aliaj religiaj minoritatoj: “Mi ŝatis la sindevigon por kunlaborado kaj solidareco inter personoj, kiuj apartenas al diversaj religioj, instigante ĉiujn antaŭenporti la agadon por spirita la morala reconstruo de la socio. Ili kunlaboras kiel aŭtentikaj gefratoj. Ke la Sinjoro benu Sarajevo kaj Bosnion-Hercegovino”.



## La tago en Sarajevo

Mi estas en Sarajevo “kiel pilgrimanto de paco kaj dialogo”. Tion diris Francisko dum sia unua parolado en Bosnio-Hercegovino. Memoriginte la historian viziton de sankta Johano Paŭlo la 2-a antaŭ 18 jaroj, li substrekiis, ke la konkordo hodiaŭ travivata en Sarajevo, post la milit-jaroj, estas ekzemplo por la tuta mondo.

La kulmina momento de la vizito estis la Meso en stadiono Kosevo, plenplena en ĉiu spaco. Pli ol 60.000 fideluloj ĉeestis, inter ili kripluloj kaj vunditoj de la milito de la naŭdekaj jaroj. Al ĉiuj Francisko adresis la inviton esti metiistoj de paco en epoko, kiam en la mondo oni perceptas etoson de milito. Pro tio alte leviĝis lia alvoko: “Neniam plu la milito!”.

Renkontante en la Katedralo de la Sankta Koro la pastrojn, gereligiulojn, seminariajn, kandidatojn kaj kandidatinojn je la religiaj ordenoj, la Papo instigis “rehavi memoron por fari la pacon”: “Vi ne rajtas forgesi vian historion; ne por revenĝi, sed por fari la pacon”.

Kaj dialogo estas lernejo de humaneco kaj elemento de unueco, kiu helpas konstrui socion bazitan sur toleremo kaj reciproka respekto: tion memorigis poste Francisko en la internacia franciskana studenta centro, alparolante la reprezentantojn de la religiaj konfesioj ĉeestantaj en Bosnio-Hercegovino. La renkonton karakterizis preĝo por la paco en la lando kaj en la mondo.

La lasta renkontiĝo en Sarajevo estis tiu kun la gejunuloj, kiujn la Papo difinis “printempaj floroj”: “Vi ĉiuj kune laboru por la paco, por ke ĉi tiu estu lando de paco”, ĝi estis la improvizita bondeziro, kiun ankaŭ en la kroata li lasis al la junularo. Temis pri renkontiĝo farita per atestoj, kantoj kaj dancoj, markita de la flugado de kolombo el la junulara centro Johano Paŭlo la 2-a, signifa loko, en kiu de post la milit-fino la geknaboj aktivis por projektoj de kunvivado kaj interetna kaj interreligia dialogo. “La tasko, kiun mi postlasas al vi”, finis la Papo, “estas fari la pacon”.

*Fotojn fotis Marija Belošević, vicprezid. de IKUE*



## Historio kaj prezento de la urbo, kiu gastigos la 21-an Ekumenan Esperanto-Kongreson (1-8/8/2015)

### VIZITI STRASBURGO'n

Strasburgo estas belega urbo, de ĉiam krucvojo de la kontinenta Eŭropo (ĝia nomo en la germana signifas: kruciĝo de stratoj), duonvoje inter Parizo kaj Prago. Ĝi estas urbo malfermita kaj kosmopolita, kie katolikoj kaj protestantoj vivas harmonie kaj preĝas en la sama Katedralo. Ĝia kosmopoliteco kaj centreco estis kelkaj el la motivoj, pro kiuj oni decidis igi ĝin unu el la ĉefurboj de la unuigota Eŭropo, starigante tie la sidejon de la Eŭropa Parlamento kaj de la Eŭropa Komisiono por la Homaj Rajtoj.



*La Katedralo Notre Dame en Strasburgo*

Sepa urbo de Francio laŭ nombro da loĝantoj (ĉ. 270.000), ĉefurbo de Alzaco, ĝia koro estas en la malnova historia centro, kiu staras sur insulo de rivero Ill kaj ĝin superrigardas la impona gotikstila Katedralo kun ĝia pinaklo alta 142 metrojn. En parto de la insulo estas la malnova kvartalo kun lignokradaj dometoj (*"Petite France"*), iama kunvenejo de fiŝkaptistoj, tinkturistoj kaj muelistoj; hodiaŭ en ĝi estas metiejoj. Tiu loko, kie la tempo aspektas haltinta pro la stratetoj, turhavaj pontoj kaj la lignokradaj tegmentoj, estas de 1988 monda heredaĵo de Unesko.

### La historio de la urbo

Strasburgo havas la plej gravan riveran havenon de Francio. Fondita antaŭ pli ol 2000 jaroj, la urbo kreskis en marĉejo apud rivero Ill. Ĝi estis romia armea kampo kaj en la jaro 357 batal-loko de romianoj, gvidataj de la estonta imperiestro Juliano la Apostato kontraŭ Alemano. Ĉi-lastaj, post la falo de la Imperio, ekloĝis en la regiono kaj en la areo de la nuna Svislando. En la 5-a jc. Strasburgon ekregis Hunoj kaj poste Frankoj. La 4-an de Februaro 842 tie okazis la Ĵuro de Strasburgo (ĝi simbolas la naskiĝon de la franca kaj germana lingvoj kaj estas promeso pri militasistado inter du nepoj de Karolo la Granda, Karlo la Kalva kaj Ludoviko la Germano, kontraŭ ilia frato Lotaro).

Dum Mezepoko la strategia lokiĝo igis la urbon grava komerca centro. Dank' al tio, en 1262, ĝi fariĝis libera urbo de la Sankta Roma Imperio. La tiuepoka ekonomia riĉeco estas atestata de la gravaj konstruaĵoj ankoraŭ hodiaŭ ekzistantaj kaj motivo de orgojlo por la loĝantoj. Dum la religiaj disputoj de la 16-a jc. la urbo akceptis la luteranan doktrinon. Ekde la 17-a jc. ĝi estis disputata inter Fran-



cio kaj Germanio. Strasburgo fariĝis franca en 1681, sub la regado de Luizo la 14-a, kaj la konkeron ratifis la Traktato de Ryswick

(j. 1697). Alia kontribuo al la “franciĝo” de la urbo estiĝis, kiam la franca nacia himno “La Marseljezo” estis komponita ĝuste tie. Post la milito inter Francio kaj Prusio (j. 1871) la Traktato de Frankfurto redonas Strasburgo’n al Germanio. Ĝi refariĝis franca en 1919 je la fino de la 2-a mondmilito per la Traktato de Versailles, kaj denove germana dum la jaroj de la 2-a mondmilito ekde 1940 ĝis 1945. Pro la ŝanĝo de sia nacieco kvar fojojn dum 75 jaroj (inter 1870 kaj 1945) Strasburgo fariĝis la urbo-simbolo pri la franca-germana repaciĝo, kaj pli ĝenerale de la eŭropa unuiĝo. La urba monumento dediĉita al la falintoj de ĉiuj militoj montras patrinon, kiu subtenas du filojn, simboligante tiel Francion kaj Germanion: ili estas nudaj, sen iuj aĵoj uniformo de unu aŭ de alia partio.



### Ĝiaj vidindaĵoj

Unu el la pli allogaj manieroj por viziti la urbon estas boatado laŭ la kanaloj, kiuj ĉirkaŭas la malnovan parton: eblas vidi,

interalie, la “*Ponts-Couverts*”, la kovritajn pontojn, kunligitajn kun la mezepokaj gardoturoj, iamaj strategiaj defendiloj en la kvar kanaloj de rivero Ill kaj ĉe la pitoreska



*Malnova kvartalo kun belegaj pontoj*

“*Petit France*”, la menciita malnova kvartalo de la tanistoj, riĉa je mueliloj kaj traŭrata de belegaj pontoj. Strasburgo, krome, estas tipa universitata urbo.

Unu el la vizitindaj lokoj estas sendube la mirinda Katedralo de *Notre-Dame* (Nia Sinjorino), realigita per sabloŝtonoj, ĉefverko de plektaĵoj kaj ornamaĵoj ĉizitaj en la ŝtono. Ĝia konstruo komenciĝis en la 11-a jc. (la ĥorejo estas romanika kaj la navo estas gotika) kaj finiĝis nur en 1439; en tiu epoko ĝi estis la plej alta konstruaĵo en la mondo. La okcidentan fasadon oni finkonstruis en 1284, sed la turpinto alta 142 metrojn datiĝas de du jarcentoj poste. Oni projektis saman turpinton en la mala latero, sed oni neniam realigis ĝin. La belegaj vitraĵoj, kiuj reflektas la lu-



*Parlamento de Eŭropa Unio en Strasburgo*

mon en la internon sub formo de flagobriloj, datiĝas inter la 12-a kaj 14-a jc.. Ankaŭ la orgeno, orumita kaj kolorplena, datiĝas de la 14-a jc., dum la astronomia horloĝo ekfunkciis en 1842, laŭ malnova mezepoka projekto. El la belvidejo oni ĝuas belegan panoramon kaj somere tie okazas koncertoj de klasika muziko, ĉefe per orgeno. En la placo de la Katedralo, la *Maison Kammerzell*, hodiaŭ restoracio, estis la loĝejo de riĉega negocisto: ĝia pompa fasado datiĝas de la 14-a jc.

Alia vidindaĵo estas *Palais Rohan*, klasika palaco projektita de la reĝa arkitekto Robert de Cotte en 1730 por la princoj - episkopoj de la urbo. Nun ĝi estas sidejo de 3 Muzeoj: en la Muzeo de dekoraciaj artoj estas unu el la pli mirindaj francaj kolektoj de ceramikaĵoj. La Muzeo de belartoj estas konata ĉefe pro la italaj pentraĵoj, ĉefe renesancaj (sed ankaŭ de aliaj epokoj: ĝi konservas verkojn de Giotto, Botticelli, Raffaello, Veronese, Canaletto kaj Tiepolo), pro la hispanaj pentraĵoj (i.a. de El Greco kaj Goya) kaj pro la nederlandaj majstroj ekde la 15-a ĝis la 17-a jc. (inter kiuj estas Rubens kaj Van Dyck). La arkeologia Muzeo trajtas vastan periodon de la historio de la regiono: ekde 600.000 jaroj antaŭ Kristo (unuaj spuroj de prahomoj) ĝis la postrestaĵoj de la romia epoko kaj de la jaroj de Karolo la Granda. Estas en ĝi ankaŭ la restaĵoj de mortintaj specioj.




Preĝejo de s-ta Paŭlo de reformita eklezio

## NASKIĜO DE LINGVOJ

La Ĵuro de Strasburgo (*Sacramentā Argentariae*) estas taksata la unua oficiala akto skribita en la vulgara franca kaj germana. Pro tio ĝi havas grandegan kulturen valoron por Francio kaj Germanio.

La teksto entenas la akordojn, per kiuj la nepoj de Karolo la Granda alianciĝas kontraŭ la celoj de sia frato Lotario, ĉiu ĵurante en la lingvo de la alia. La akton oni subskribis la 14-an de Februaro 842. Karolo la Kalva, suvereno de la franca parto de la Karolida Imperio (aŭ Okcidentfranka Imperio), eldiris en la pragermana (“teudisca”) sian ĵuron, por ke lin komprenu la trupoj de lia frato Ludoviko la Germana, suvereno de la orienta kaj germana parto de la francaj teritorioj. Li diris: *“In Godes minna ind in thes christianes folches ind unser bedhero gealtnissi, fon thesemo dage frammordes, so fram so mir Got geuuizci indi mahd furgibit, so haldih tesan minan bruodher, soso man mit rehtu sinan bruodher scal, in thiu, thaz er mig sosoma duo; indi mit Ludheren in nohheiniu thing ne gegango, zhe minan uuillon imo ce scadhen uuerhen”*.



Eltiraĵo el la ĵuro

Ludoviko ĵuras en la prafranca (“romana lingua”), por ke lin komprenu la trupoj de Karolo, dirante: *«Pro deo amur et pro christian poblo et nostro commun salvament, d’ist di in avant, in quant deus savir et podir me dunat, si salvarai eo cist meon fradre Karle*

*et in aiudha et in cadhuna cosa, si cum om per dreit son fradra salvar dist, in o quid il mi altresi fazet, et ab Ludher nul plaid nunquam prindrai, qui meon vol cist meon fradre Karle in damno sit.»*

Tekstoj sufiĉe malsamaj ol la nunaj franca kaj germana, kaj tamen ĉi tiuj lingvaĵoj estas la rektaj praidoj de la nunaj lingvoj: la prafranca – samkiel aliaj latinidaj lingvoj – naskiĝis el la cindroj de la latina: tiu parolata en Gaŭlujo, kamparana kaj provinca latino, kiu pli kaj pli diferenciĝis de la skribita kaj parolata lingvo de la kleruloj kaj de la Eklezio.

La tekstojn de la ĵuro oni konas dank’ al kroniko verkita de la kuzo de Karolo la Kalva, Nitardo; lian manuskripton konservas la Nacia Biblioteko de Parizo. En Esperanto ili tekstas: *«Pro amo al Dio kaj por la kristana popolo kaj nia komuna savo, de tiu ĉi tago antaŭen, tiom da saĝo kaj povo, kiom Dio donas al mi, tiel mi savos tiun ĉi mian fraton kaj en helpo kaj en ĉiu okazo, tiel ke oni per rajto devas savi sian fraton, dum li faras same al mi, kaj mi neniam vole akceptos akordon de Lotaro, kiu metas tiun ĉi mian fraton en malutilon»*.



*Astronomia horloĝo en Katedralo Notre Dame*

## La Marsejla el Strasburgo

Malmultaj scias, ke “La Marseljezo”, la himno de la Franca Respubliko, naskiĝis ne en Marsejlo, sed en Strasburgo. Fakte, la 24-an de Aprilo 1792, Philippe-Frédéric de Dietrich, unua konstitucia prefekto de Strasburgo, regalis per adiaŭa vespermanĝo la voluntulojn de la Rejna Armeo. Dum interparolo aperis la bezono havi militistan kanton indan je la entuziasmo de la trupoj. Dietrich petis al Claude Joseph Rouget de Lisle komponi ion, kiu meritu esti kantata. De Lisle tuj laboris kaj la postan matenon li jam finis muzikon kaj tekston. La kanto unue nomiĝis “*Chant de Guerre pour l’Armée du Rhin*” (Militkanto por la Rejna Armeo); en 1792 marsejlaj regimentanoj eniris Parizon kantante tiun ĉi kanton, kiun la parizanoj sekve renomis *La Marseillaise*.



*Rouget de Lisle, kreinto de la Marseljezo, kantas ĝin je la unua fojo*



## 21-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO

(65-a de KELI kaj 68-a de IKUE)  
Strasburgo, Francio, 1-8/8/2015

“Donu al mi trinki (Joh 4,7)” “La malsameco pliriĉigas min”



Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) invitas vin al la ĉefurbo de Alzaco kaj de Eŭropo por partopreni en la Ekumena Esperanto-Kongreso 2015.



Strasburgo atendas vin de la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2015. Vi estos akceptataj en la junulardomo Ciarus proksime de la centro de la urbo. Estas bona okazo ekumene postkongresi post la UK en Lillo. Ni esperas, ke vi profitos kaj la kongreson kaj la urbon.

**ĴAŬDON LA 6-an DE AŬGUSTO,  
ekde la horo 10-a ĝis la horo 13-a**

la membroj de IKUE havos sian renkontiĝon  
kadre de la EEK en Strasburgo.

### 100-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, LILLO (F), 25.07/01.08/2015

Konfirmiĝis la ĉeesto de IKUE kaj de la E-redakcio de Radio Vatikana per propra budo dum la Movada Foiro en Lillo. La rendezuo estos sabato, la 25-an de Julio, en vasta halo ĉe la interetaĝo de la kongresejo. Komencohoro: 19h00. La ekspozicion prizorgos la vicprezidantino de IKUE, Marija Belošević.

## UNUAĴO DE PAPO

La 22-an de Junio 2015, en Torino (Italio), Francisko estis la unua Papo, kiu eniris en valdanan templon: 841 jarojn post la naskiĝo de la movado de la «malriĉuloj de Liono» fondita de komercisto Valdo, kaj 831 post la ekskomuniko de Papo Lucio la 3-a. Jarcentoj da persekutoj, amasbuĉadoj, diskriminacioj (nur en 1848 Karlo Alberto el Savojo rekonis al la valdanoj la civitanajn rajtojn).

Francisko diris: «Flanke de la Katolika Eklezio mi petas vian pardonon pro la sintenoj kaj la kondutoj ne kristanaj, eĉ ne

homaj, kiujn, en la historio, ni havis kontraŭ vi. En la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, pardonu nin!»). La valdana ĉefa centro estas, en Italio, Torre Pellice (Piemonto). Kaj jen la rilatoj inter valdanoj kaj Esperanto:

– antaŭ kaj post la unua mondmilito, Esperanto prosperis en Torre Pellice, precipe pro la agado de la valdana pastoro Alessandro Vinay;

– en 1967, okazis en Torre Pellice la Kongreso del KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).

*(Informis: Antonio De Salvo)*

## LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ EN WROCLAW (PL)

De la 15-a ĝis la 19-a de Aprilo 2015 okazis en Pollando en la urbo Vroclavo la kvar Bibliaj Tagoj, en kiuj partoprenis 45 esperantistoj katolikaj, luteranaj kaj ortodoksaj el sep eŭropaj nacioj: Ĉeĥio (7), Germanio (12), Italio (3), Nederlando (1), Rumanio (2), Slovakio (2) kaj Pollando (18).

Antaŭ la kunveno, la domo de la Fratinoj de Notre Dame, atendis la partoprenantojn Stefan Lepping kaj Teresa Pomorska, ĉeforganizantoj de la kunveno. Post la vespermanĝo ĉiuj partoprenantoj kuniĝis en la salono de la domo por la interkona vespero, kie ili renkontis malnovajn geamikojn kaj ekkonis aliajn novajn.

Dum la tuta daŭro de la kunveno ĉiu tago komenciĝis per Sankta Meso, sekvis la matenaj laŭdoj, la matenmanĝo kaj la prelego pri Apokalipso fare de pastro Willibald Kuhnigk, dividita laŭ tri partoj, unu potage. La prelego celis montri, ke la lasta libro de la Biblio ne volas priskribi katastrofan mondfinon, sed kuraĝigi ne nur la unuajn kristanojn, timantajn la finon de la mondo, sed ĉiutempajn homojn, por ke ili plutenu la fidon kaj la esperon, ne deturniĝante de Jesuo Kristo, la sola venkinto kontraŭ la malbono kaj la morto.



*Kapelo, en kiu okazis Diservoj*

Post la vespermanĝo Miloslav Šváček vidigis al ni la projekciaĵojn pri la ekuvena kongreso en Vroclavo de la jaro 2009 kaj pri tiu en Trento (Cadine) en la jaro 2014.

Vendredon la 17-an posttagmeze oni vizitis la kvartalon de la kvar religiaj konfesioj kaj la respektivajn preĝejojn: la katolikan, la luteranan, la ortodoksan kaj la sinagogon. En la katolika preĝejo de Sankta Miĥaelo, la parokestro, pastro Alexander Radecki, prelegis en pola lingvo pri la liturgio de la muziko, kun samtempa tradukado en esperanton farita de iu partoprenanto. Post la vespermanĝo, en la kunveneja



*Domo Notre Dame, en kiu okazis la kongreso*

Jaŭdon la 16-an posttagmeze, en religia universitato, antaŭ kies enirejo oni povis admiri belegan statuon prezentantan Mikelaĝelon, oni vizitis ekspozicion de preĝeja ilaro, poste oni iris al la preĝejo de Sankta

Jaŭdon la 16-an posttagmeze, en religia universitato, antaŭ kies enirejo oni povis admiri belegan statuon prezentantan Mikelaĝelon, oni vizitis ekspozicion de preĝeja ilaro, poste oni iris al la preĝejo de Sankta



*Partoprenantoj de Bibliaj Tagoj antaŭ Nacia Muzeo*



*Prelegas sac. Wilibald Kuhnigk*

certon kun violono, violonĉelo kaj pianolo, intermetitan fojfoje de muzikaj pecoj kantataj de sopranulino kaj de du tenoroj. La belega vespero finiĝis per kanzonoj kantataj ĥore de la kunvenintoj kun akompano de la gitaro de Stefan Lepping.

La dimanĉo komenciĝis per matena sankta Meso por la katolikoj, en la preĝejo de Sankta Marteno, kaj por la aliaj, en la preĝejo de la domo, laŭ ilia rito. Poste, en la salono, la kunvenintoj rekuniĝis lastfoje ĉirkaŭ pastoro Rohloff, kiu legis kaj komentis psalmojn kaj elektitajn pecojn de la Biblio.

Post la tagmanĝo sinsekvis la reciprokaj adiaŭoj kaj ekveturoj, ĉiu el ni kun belega memoro pri agrabla, neforgesebla restado en Vroclavo. Norma Cescotti (*el Katolika Sento*)

salono, la fama gitaristo Patryk Filipowicz ĝojigis nin per koncerto.

Sabaton la 18-an ni vizitis la preĝejon de Sankta Maria sur la sablo, poste ni aliris la botanikan ĝardenon kaj la grupo disiĝis por promeni ĝis la kvara horo, kiam la grupo rekuniĝis en la malnova preĝejo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo, kie la luterana Pastoro Wolfram Rohloff celebris la Sanktan Manĝon. Post la vespermanĝo muzika kvaropo plenumis kon-



*Prelegas pastoro Wolfram Rohloff*

## *Ni funebras kaj kondolencas*

### **EUGENIUSZ RYBARCZYK (1931-2015)**



La 2-an de Aprilo 2015, post kelktempa grava malsano, nia L.R. en Danlando Eugeniusz Rybarczyk forpasis. Li estis poldevena, naskiĝinte la 14-an de Septembro 1931. La rekviema meso - en la pola lingvo - okazis la 10-an de Aprilo en la katolika preĝejo "Sankta Anna" en Kopenhago, Danio, kie li loĝis. Post la meso la akompanantaro, konsistanta el familianoj, geamikoj - poloj, danoj kaj esperantistoj - perpiede akompanis Eugeniusz al lia lasta ripozejo en la tombejo de Sundby. Eugeniusz estis tre aktiva en la E-movado. Membro de la kopenhaga Konversacia E-Klubo (KEK), de tempo al tempo

li gvidis klubvesperojn, faris prelegojn. Li ankaŭ estis gvidanto de urbaj rondiroj kaj ekskursoj en la regiono de Kopenhago. Li estis unu el la kontaktpersonoj de la Kopenhaga E-Kulturgrupo (KEKG), kiu aranĝis prelegvesperojn en La Civitana Domo de Frederiksberg. Li ankaŭ partoprenis eventojn en la pola ambasadorejo en Hellerup, en la kopenhaga regiono. Per nelacigebla energio Eugeniusz fervore laboris por disvastigi la konon pri E-o. Ekz. li aĉetis kaj sendis librojn, revuojn kaj aliajn esperantaĵojn al diversaj personoj, kun oferemo kaj malavareco. E-o estis granda parto de lia vivo same kiel la katolika eklezio. Li ankaŭ tradukis informilojn pri kopenhagaj preĝejoj, protestantaj/katolikaj, i.a. pri la katolika katedralo "Sankta Ansgaro" en Kopenhago. Ankaŭ danlingva informilo pri E-o kaj la kristana eklezio estas verko de lia mano. Eugeniusz estis tre aktiva en la eklezia vivo en Danio. Li partoprenis polajn kaj danajn mesojn; same kiel li ofte ĉeestis la polajn kaj danajn eventojn, en la Eklezio. Al lia filino, Anna, al lia bofilo kaj al la danlanda kaj pola E-movado sincerajn kondolencojn. Kaj al mortinta frato Eugeniusz Rybarczyk ni deziru eternan feliĉon en la brakumo de resurektinta Kristo. (*informis Clara Jansen*)

*Ripozon eternan donu Sinjoro al li, kaj senfina lumo lumu al li, li ripozu en paco. Amen.*

## KONGRESO DE LA ITALA SEKCIO DE IKUE (UECI)

Ĉi-jare la UECI-kongreso okazis en Sestri Levante (Ligurio, Italio), ĉe la domo Opera "Madonnina del Grappa", (t.e. la sama domo kiu gastigis la antaŭan Kongreson de 2007) de la 22-a ĝis la 25-a da Majo. La aliĝintoj estis malmultaj (27), sed la partoprenantoj pli malmultaj (19), eble pro la ekonomia krizo, aŭ pro la lastminuta ŝanĝo de la kongresurbo, kiu devis esti La Spezia, sed ĉefe pro abruptaj malsaniĝoj, kiuj malpermesis la alvenon de 8 personoj. Malgraŭ tio la kongreso bone progresis. Post la vendreda enloĝigo, la sabato estis dediĉita al la temo de la kongreso "la Sinodo pri la Familio" kun prelegoj de Giovanni Daminelli kaj Norma Cescotti kaj amuziga intermezo de Gianni Conti pri sia persona interpreto de la "Dia Komedio". Dimanĉon matene okazis la jara asembleo de UECI kun la elekto de la nova estraro. Sekvis la Sankta Meso de Pentekosto. Posttagmeze oni ekskursis per ŝipo al Abatejo de San Fruttuoso kaj al Portofino. La tago finiĝis per la adiaŭa vespero.

Lundon matene ni renkontiĝis por konkludi la jaran asembleon, prezenti la novan UECI-estraron kaj eltiri la konkludojn de la temo pritraktita. Kiel kutime, ĉiutage oni preĝis la Matenajn Laŭdojn, celebris Meson kaj ĉantis la Vesperajn laŭdojn.



## PATRO NIA EN JERUSALEMO

Sur la Olivarba Monto estas la preĝejo de Patro Nia, starigita en la loko, kie, laŭ la tradicio, Jesuo instruis la preĝon Patro Nia. La preĝejon oni konstruis en 1882: antaŭe tie estis preĝejo konstruigita de sankta Helena, patrino de imperiestro Konstanteno, kaj detruita dum la invado de persoj en 514. La murojn kaj la klostron de tiu preĝejo kovras paneloj kun diverslingvaj tradukoj de la Patro Nia, ankaŭ en E-o. Jerusalema esperantisto, Yehuda Miklaf, sciigis, ke la E-lingva panelo ne estas en bona kondiĉo kaj proponis rebonigi ĝin kun kosto inter 2.000 ĝis 3.000 eŭroj. Pastro Bernhard Eichkorn, Villingen (D) disponigis sian bankan konton por kolekti la necesan sumon. IBAN: DE47 7509 0300 0006 4894 51 BIC: GENODEF1M05

## OKAZOS IKUE-RENKONTIĜO EN LA URBO TŘEBOŇ, ĈEĤIO

En la semajnfinaĵ tagoj 11.-13.9.2015 okazos renkontiĝo organizata fare de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio en la belega sud-bohemia historie ri-

ĉa urbo Třebonj, situanta en ĉarma pejzaĝo kun multaj fiŝlagetoj kaj ĝi ankaŭ estas konata pro sia torfa banloko. En multaj direktoj ĝi estas specifa precipe pro pitoreskaj monumentaĵoj de la urbokonstruata valoro, ĉar ĝi estas ununura urbo en Bohemio, kies urbocentro estas ĝis nun ĉirkaŭita per ĉiuj originaj urbaj pordegoj. Tial ĝi estis deklarita urba rezervejo de monumentoj kaj la ĉirkaŭa naturo protektita naturregiono kaj biosfera rezervejo de UNESCO. Pliajn informojn kaj aliĝilon eblas akiri pere de interreto el la interretaj paĝoj de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio: <http://www.ikue.org/cz/trebon/trebon.htm>.



*Kripto de familiaro Schwarzenberg*